



>Ni pontu <

'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

Pli ol 1000 gejunuloj, el foraj eĉ mondanguloj, alportis freŝecon al sia kongreso, okazinta ĉi-monate en Italio. Ili festis la 50-an jubileon de la Gen-movado (juna generacio de Fokolaro). La movadon, en jaro 1966 iniciatis Chiara Lubich tiucele kaj espere, ke la gejunuloj transiru limojn de la kulturoj, lingvoj, kaj religioj serve al amikeco kaj monda paco.



Nehaltebla generacio

Kiam ili ligos siajn ideojn kaj energion, multaj ŝanĝoj povas okazi en la mondo. La jubileon oni celebris ankaŭ en aliaj kontinentoj, ekz. en afrika Tanzanio kaj la gejunuloj diras, ke malgraŭ la pasintaj 50 jaroj, neniu haltigos ilin en forĝado de la sekvaj jardekoj.



GenFest estas la renkontiĝo de junaj membroj kaj amikoj de Fokolara Movado kiuj prezentas plurajn aktivaĵojn (egz. teatron, pentroarton, koncertojn) kaj dividas siajn spertojn, en konteksto de diversaj kulturoj kaj sistemoj. La vorto "Genfest" estas kombinaĵo de *nova generacio* kun *festo*. La unua tiuspeca evento okazis en jaro 1973 kun la ĉeftemo: "Homa mondo trans ĉiuj bariloj". Al Toskania regiono venis ĉ. 8,000 gejunuloj kaj tiam formiĝis la unua internacia muzikgrupo Gen Rosso (poste aperis ankaŭ Gen Verde / "verda generacio"). Post tri jaroj, al GenFest veturis preskaŭ 20,000 kaj en la Roma Palaco de Sporto oni ĝoje anoncis: "*Jen la naskiĝo de l' nova mondo!*".

En jaro 1980, Stadiono Flaminio (sportejo de la futbala klubo Atletico Roma FC) gastigis jam 40 mil kaj tiam oni uzis unuafoje la nomon Junularo por Unuiĝanta Mondo – **JpUM** (Y4UW - Youth for a United World / Giovani per un mondo unito).




GenFest – la senfina printempo

La sekvaj eventoj estis organizitaj en jaroj: 1985 (Internacia Jaro de Junularo), 1990: oficiala fino de la "malvarma milito". 1996: per satelitaj ligoj kaj la montrita tutmonde reto-2000, sojle de la tria milenio kaj lige kun la Mondaj Tagoj de Junularo.

Amikoj el JpUM vivas en ĉiuj kontinentoj, apartenas al diversaj nacioj, kulturoj, religioj, socisistemoj kaj havas unu komunan deziron: konstrui la mondon pli unueca. Ili pretas kunlabori por alta idealo de la universala frateco, konstrui pontojn trans dividojn: en vunditaj familioj, inter generacioj kaj socio en kiu ili vivas.

Ili engaĝas sin en internaciaj kampanjoj por apogi justan pacon, kiel volontuloj en regionoj de naturaj katastrofoj aŭ militoj. Je la regiona nivelo, JpUM organizas lokajn eventojn - por esti proksime al marĝenigitaj personoj, strat-infanoj, senhejmuloj kaj malriĉaj familioj. Tiel, per sia propra atesto, ili kuraĝigas la samaĝan junularon ekaktivi en siaj loĝlokoj. Jen la mondo por kiu valoras labori, ke ĉiu homo estu respektita kiel membro de unu humana familio.

En la nova jarmilo (post jaro 2000), okazis kelkaj Genfestoj kun tiu neforgeseblan en Budapeŝta Sportareno -2012, nomita "**Ni pontu**" (Ni konstruu pontojn / *Let's bridge*). La devizo tie konvenis, ĉar ambaŭ partojn de la ĉefurbo ligas belaj pontoj trans la Danuba Rivero.



Valoras memori, ke tiu renkontiĝo ricevis fortan apogon de la hungara registaro, pri kio "NU" aperigis artikolon.

Sekvajare Junularo por Unuiĝanta Mondo, kun aliaj internaciaj organizaĵoj, partoprenis en la 8a Junulara Forumo organizita de **UNESKO** (UN-Komisiono pri Edukado, Scienco kaj Kulturo).

Oni kreis la Forumon en 1999 por doni al juna generacio la eblecon prezenti siajn zorgojn kaj ideojn kaj kungvidi la direkton por UNESKO-agado. La 9a Junulara Forumo okazis denove en la Pariza UNESKO-ĉefoficejo, fine de la ĉijara oktobro. Ĉi tie videblas duminuta filmeto : <https://www.youtube.com/watch?v=LrHVCuzJP3M> en angla, hispana kaj franca lingvoj (mankas E-traduko).



<
Maldekstre: genFest en Nigerio

“**Nova Urbo**” (Città Nuova / New City) estas internacia socikultura magazino de Fokolara Movado, kiu antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj, komunumoj kaj – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996. Sekvajare, dum la vizito de Ch. Lubich en Usono (majo 1997), ni havis la okazon renkonti ŝin kaj peti pri la konsento eldonadi la bultenon “Città Nuova / New City” ankaŭ en Esperanto.

Kun helpo de pola esperantisto kiu doktoriĝis en Italio pri juro kaj komunikado, ni klarigis ke Esperanto funkcias same kiel aliaj naciaj lingvoj kaj bone utilas al internacia kompreno. Samtage, ni ĝoje ricevis ŝian aprobon kaj ekde tiam “Nova Urbo” aperas kaj informas pri pozitivaj eventoj en diversaj partoj de la mondo. Akceptis ĝin bone la esperantistaj legantoj, ĉar ankaŭ nia Internacia Lingvo kontribuas al amikeco kaj paco.

*


Città Nuova /New City estas socikultura magazino eldonata de Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj en multaj aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO – *Ciudad Nueva*; AŬSTRALIO – *New City*; BELGIO - *Nieuwe Stad*; BRAZILO - *Ciudade Nova*; BRITUJO - *New City*; BULGARIO - *Nov Svjat*; ĈILIO – *Ciudad Neava*; ĈINIO (Hongkongo) - *San Sin Seung*; DANLANDO - *Ny Stad*; **ESPERANTUJO** - *Nova Urbo*; FILIPINOJ - *New City*; FRANCUJO - *Nouvelle Cite*; GERMANIO - *Neue Stadt*; HISPANIO - *Ciudad Nueva /Ciutat Nova* (en kataluna lingvo); HUNGARIO - *Uj Varos*; JAPANIO - *Uno*; KANADO - *Nouvelle Cite*; KENIO - *New City /Nouvelle Cite*; KOLUMBIO - *Ciudad Nueva*; KOREUJO - *Kumul*; KROATIO - *Novi Svijet*; LIBANUJO – *Citte Nouvelle*; NEDERLANDO - *Nieuwe Stad*; OCEANIO - *New City*; POLLANDO - *Nowe Miasto*; PORTUGALIO - *Cidade Nova*; RUMANIO - *Oras Nov*; SLOVAKIO - *Nove Mesto*; SLOVENIO - *Novi Svet*; SVEDIO - *Enald Varld*; SVISLANDO - *Citta Nuova*; URUGVAJO - *Ciudad Nueva*; USONO – *Living City*; VENEZUELO - *Ciudad Nueva*.

Olimpismo (parto 3)

IOK daŭrigas lian ideon kaj deklaras pretecon kunlabori kun aliaj organizaĵoj surbaze de sporto, edukado kaj kulturo. IOK ricevas apogon de la apartaj naciaj komitatoj kaj sian aktivadon direktas precipe al juna generacio. Post la du teruraj mondmilitoj, Greka Olimpika Komitato, apogita de IOK, malfermis unuajn konstruaĵojn apud Olimpia, kio estis netaksebla donaco de Grekio al olimpismo kaj al tuta mondo.

Internacia Olimpika Akademio

Fondinte la Olimpikan Movadon, Pierre Coubertin kredis, ke sportoj grave kontribuas al harmonia progreso de la homa korpo, karaktero kaj menso. En siaj verkoj, li klare esprimis la deziron ke la ideo de Olimpismo servu al moderna mondo kiel eduka sistemo. Antikva Grekujo kreis la bazajn principojn de la fizika kulturo, kiuj hodiaŭ estas firme ligitaj kun la Olimpika Movado. Per disvastigo kaj protektado de tiuj principoj, la centrejo realigos la idealojn kiujn Pierre de Coubertain iniciatis per revivigo de la modernaj olimpikoj. La ideo estis entuziasme akceptita kaj dum jardekoj bonege servas al edukado per sportoj.



La revo de Coubertain realiĝis nur post lia morto. Por disvastigi la idealojn de olimpismo, en jaro 1961 oni fondis internacian kultur-centrejon en la antikva Olimpio, kie ĉio komenciĝis antaŭ pli ol 2700 jaroj. Tio estis la reala bazo, kiu ebligis fondon de Internacia Olimpia Akademio - IOA (International Olympic Academy /greke: Διεθνής Ολυμπιακή Ακαδημία). Komence, la fondintoj difinis ĉefcelojn de IOA: ebligi sciencajn studojn pri olimpismo, antaŭenigi ĝiajn valorojn kaj riĉigi la movadon per novaj projektoj.

En la konstruaĵoj de IOA troviĝas hodiaŭ riĉa biblioteko kun 16,000 libroj kun legsalono, aŭditorio kun 500 sidlokoj, 5 klasĉambroj, restoracio kaj multaj dormoĉambroj por studentoj kaj profesoroj. Por gastoj kiuj veturas al Olimpio, laboras tie speciale preparita personaro. Ili zorgas, ke la olimpika edukado progresu laŭ la idealoj fiksitaj de la fondinto, Pierre de Coubertin.

IOA promocias idealojn kaj filozofion de la Olimpika Movado kaj organizas Internaciajn Sesiojn por Junaj Paroprenantoj. - <http://ioapa.org>. Kunlabore kun la Peloponeza Universitato kaj la naciaj Olimpikaj Komitatoj, IOA organizas du-jarajn postdiplomajn studojn pri sporta edukado kaj olimpismo. Aparte por junularo okazas tie someraj kursoj.



Tie oni povas renkontiĝi kun la sciencistoj, profesoroj kaj olimpikaj ĉampionoj, kies atingiĝoj ofte inspiras gejunulojn al memedukado kaj intensaj ekzercoj. Metiejo por edukantoj, ĵurnalistoj malfermas novajn eblecojn al ĉiuj interesitaj sportemuloj.

Kvankam la ĉefoficejo de IOA funkcias en Ateno, sed pliparto da konstruaĵoj troviĝas en la magia Olimpio, kie alvenintoj povas studi inter la naturo, proksime al antikva stadiono kaj al aliaj arkeologiaj objektoj. La unuan Sesion por Junaj Partoprenantoj oni organizis jam ĉe la komenco de IOK.

Al tiu internacia kurso venis 210 personoj, lokitaj modeste en simplaj tendoj. En la sekvontaj jaroj, okazis kursoj por:

- 240 prezidentoj kaj direktoroj de la naciaj IOA-branĉoj (ekde jaro 1986);
- 80 universitataj profesoroj kaj altlernejaj edukistoj (ekde 1993); 2-jaraj postdiplomaj studoj pri olimpismo (ekde jaro 1993,
- 40 partoprenintoj); sesioj kun partopreno de 30 olimpikaj medal-gajnintoj (ekde 1993) kaj multaj aliaj olimpikanoj;
- internacia seminario por ĵurnalistoj (40 partoprenantoj ekde 1986).



Entute, la konstruitaj objektoj en Olimpio gastigis preskaŭ 80,000 vizitantojn inter kiuj ĉ. 20 mil estis la partoprenantoj de la sciencaj konferencoj, kongresoj kaj de aliaj eventoj organizitaj tie de IOA. Pro tio, oni povas diri ke IOA en Olimpio fariĝis vera lulilo de la olimpika kulturo. Tio evidentiĝis precipe post la 29-aj Olimpikaj Ludoj / "Ateno-2006".

Krom tio, en diversaj partoj de la mondo laboras pli ol 500 universitataj profesoroj kaj aliaj specialistoj pri olimpismo kaj ĝiaj valoroj. La pli grandan cirklon formas dekmiloj, kiuj havis eblecon aŭskulti la prelegojn, rigardi ekspoziciojn k.t.p. Ili ĉiuj estas amikoj de olimpismo kaj formas t.n. "Olimpikan Familion".

Lastaj Olimpikaj Ludoj montras la kreskantan nombron de la partoprenantoj kaj nekompareblan popularecon de tiu monda evento. Tial, je internacia skalo, oni bezonas pli kaj pli multajn kunlaborantojn, al kiuj IOA organizas proprajn studojn kaj kursojn. Dum sia 50-jara ekzisto, IOA disvolvis la programojn, kiuj ebligis instruadon pri la filozofio de olimpismo kaj pri moralaj principoj enkondukitaj en la mondon de sportoj.



Internacia grupo de postdiplomaj studentoj imitas la figurojn sur la duon-skulptaĵo en greka muzeo (dekstra parto de la foto).

Ili venis al Grekio por dujara studado de sporta psikologio.

Multjara prezidento de Internacia Olimpika Komitato, Juan Samaranch kontribuis al fondiĝo de la naciaj IOA-branĉoj je tutmonda skalo. Tia iniciato tre utilas al kultura kaj eduka progreso de la Olimpika Movado. La IOA-centrejo en Olimpio fariĝis monda centrejo de olimpismo, per kies idealoj ĝi radias al ĉiuj kontinentoj.

Pro la kreskanta populareco de Olimpikaj Ludoj, aperis la bezono eduki multan personaron por olimpikaj eventoj. Tial volontuloj studintaj en Olimpia portas la akiritajn spertojn kaj entuziasmon al siaj naskiĝlandoj. Tiucele ili organizas publikaĵojn, ekspoziciojn, prelegojn, renkontiĝojn kaj aliaj eventojn kio tre utilas al disvastigo de la olimpikaj valoroj kaj al fortigo de la naciaj IOK-branĉoj.

Grandega populareco de sportoj kontribuis al multigo de atletikaj eventoj kaj al konstruado de stadionoj, haloj kaj aliaj sportobjektoj. Tio helpis ankaŭ al disvastigo de la slogano:

"Sporto por ĉiuj"



Ĉiu povas praktiki sportojn, sendepende de aĝo - eĉ dum longa promeno aŭ per simplaj ekzercoj

Internacia Olimpika Komitato estis fondita la 23an de junio 1894 en Parizo. Pierre de Coubertin persiste laboris por tiu sukceso.



Ekde jaro 1948, tiun daton oni celebras tutmonde kiel „Internacia Olimpika Tago” - sendepende de aĝo, fizikaj kapabloj kaj nacieco.



Ĉijare la “Eduk-tagon pri Olimpismo” organizis Greka Olimpika Akademio. La etoso estis emocia kaj solena pro la elektita loko - *Panatinaika Stadiono* (konstruita en 4a jarcento a.K.) kie okazis la unuaj modernaj Olimpikaj Ludoj en 1896.

La kunorganizantoj estis: Olimpika Centro por Militpaŭzoj, Greka Ministerio de Edukado, Urba Konsilantaro en Ateno kaj Greka Olimpika Komitato. La eventon partoprenis 35,000 lernantoj kaj instruistoj el tuta Grekio. Ili forportis la mesaĝon kaj simbolojn de Olimpiko al siaj loĝlokoj.



Blazono de la Nacia Olimpika Komitato de Grekio kaj la infanoj kiuj partoprenis la eventon

Similajn aktivecojn organizas Naciaj Olimpikaj Komitatoj en aliaj landoj: Estonio, Francio, Hispanio, Hungario, Rumanio, Slovenio, Kipro, Taĝikio, Turkio, Burundio, Dominiko, Gvatemalo, Kanado, Aŭstralio, Novzelando kaj eĉ en la ekzotikaj Sejŝeloj.



Tre interesa estas la ideo pri Olimpikaj Tendaroj. Tiam tendaron. Ekde kvar jaroj, tiaj tendaroj okazas meze de somero en Tatra Montaro (Slovakio). Organizas ĝin Slovaka Olimpika Komitato kun apodo de la Ministerio pri Sporto kaj Edukado, Olimpika Solidarec-Programo kaj Slovaka Olimpika Merkatiko.

Fine de la julio 2016, la partoprenintoj venis i.a. el Hungario, Pollando kaj el aliaj landoj de Mez-Eŭropo. Inter la sportaj ekskursoj estis ankaŭ montara grimpado kaj flosa fluo laŭ Dunajec-rivero (vidu la foton maldekstre).

Per sia aktiveco, IOA fariĝis unu el la tre popularaj neregistaraj organizaĵoj. Rezulte, tiel gravaj instancoj kiel UNO kaj UNESKO devis rekonii ke la olimpikaj idealoj inspiras milionojn da gejunuloj al malfacila trejnado kaj memdisciplino. Fortigante siajn karakterojn, ili kapablos bone labori kaj fariĝi aktivaj civitanoj.

Post fino de IOA-sesioj, la junaj partoprenantoj sentas respondecon kunlabori kadre de la Nacia Olimpika Komitato en siaj landoj. Disvastigita tiel reto grandigas la pozitivan rolon de la Akademio en la Olimpika Movado kaj plenigas breĉojn kiuj ankoraŭ ekzistas en la sporta mondo.

Olimpero (Olimp + Espero)

La supra vort-kombinaĵo prezentas la efemerajn (almenaŭ nuntempe) kontaktojn inter la olimpika kaj esperanta movadoj. Pro la tre malmultaj materialoj, ĉi tiu artikol-parto estos iom pli distra sed ankaŭ pli riĉigita per ilustraĵoj. Elirpunkto estas ĉi tie la (iom) jubilea jaro

1976



Tio okazis antaŭ 40 jaroj, pasis ok jardekoj ekde la unua moderna Olimpiko „Ateno-1896” kaj esperantistoj havis la 61-an UK, unuafoje en Grekio. Alvenis ĉ. 1300 kongresanoj kiuj – krom partopreno en diversaj prelegoj, amikaj renkontiĝoj, kulturaj eventoj – ekskursis al objektoj konstruitaj antaŭ 3 jarmiloj kaj ĝuis neforgeseblan atmosferon de la antikva greka kulturo.



En la sama somero, kanada urbo Montreal gastigis la 21-an Olimpikon kun partopreno de 6,000 sportistoj el 92 landoj.



Markeblemo de tiuj Olimpikaj Ludoj (vidu ĝin maldekstre) konsistas el tri kunligitaj elementoj: la supra similas al "M" – por Montrealo, la meza al stadiono kaj tiujn du subtenas la kvin olimpikaj cirkloj.



Por tiu evento, esperantistoj el provinco Quebec (Kebekio) aranĝis kampanjon kiu montriĝis kiel unu el la plej sukcesaj en la postmilita E-movado. Ili atingis finanĉan subtenon de la provinca registaro kaj konsenton de la organiza komitato por eldoni kellingvan „Olimpikan terminaron”. Ĝi aspektas tre bele, kun profesiaj grafikaĵoj kaj paralela traduko por ĉiu sporta disciplino. Estis tie kvar kolonoj: por Esperanto, franca kaj angla linvoj. Tre bone utilis la kolono kvara – malplena por ke ĉiu sportulo aŭ turisto povu aldoni respektive la vortojn en sia gepatra lingvo. Eldonkvanto de „Saluton amiko” estis tre alta (proksimume 10 mil ekzempleroj) kaj ĉiu partoprenanto de la Olimpikoj ĝin senpage ricevis. Komence troviĝis konciza informo pri Esperanto, tiel la presaĵo estis ege sukcesa reklamo de la Internacia Linvo. Okaze de tiu evento, unu el stratoj apud la riverego de s-ta Lorenzo en Montrealo estis nomita „Avenue Pierre De Coubertin”.

Aldone, simbolo de la 21-aj Olimpikaj Ludoj estis kastoro, kiun oni nomis „Amik” (la vorto tre populara inter esperantistoj, ĉu ne?). Supre videblas tiu nigra kastoreto kun la ruĝa zono kaj blanka markeblemo de la Olimpikoj. Tradicie, antaŭ la Universala Kongreso okazas Internacia Junulara Kongreso (konata kiel TEJO-Kongreso). La 28an IJK oni okazigis en Tesaloniko (Thessaloniki) kun partopreno de 350 gejunuloj. La organizon komitaton gvidis la tiam TEJO-prezidanto - juna psikologo el Grekio, Savas Tsitirides. La eleganta greko (kun bonega prononcado kaj parolstilo) certe plaĉis al junaj esperantistinoj, sed baldaŭ poste li malaperis el E-movado kaj ne plu retroveblas – kiel multo de la tiamaj aktivuloj.

Inter la plej sukcesaj programoj estis la tuttaga ekskurso al Sitonia Plaĝo (duoninsulo Sithonia en regiono Chalkidiki). La okcidentan bordon ĉenis rok-insuletoj kaj kelkaj kongresanoj provis tranaĝi la tutan distancon inter ili.

Tagoj estis varmegaj, do la urba vivo reviglis vespere kaj la junaj kongresanoj ĝuis promenadon laŭ la apudmara trotuaro, kun nokta vidaĵo je la haveno. De ĉiu loko, superis blanka turo – simbolo de la urbo. Survoje multaj restoracioj kaj kafejoj. La ekstere starigitaj tabloj tentis la turistojn resti tie ĝis la profunda nokto.



La kongreso finiĝis – tro frue, kiel ĉiu plezuro en la mondo. Venis tempo por adiaŭi tiun belan urbon kaj neniu tiam imagis, ke post jaroj Tesaloniko fariĝos grava sporta centro, fronte kun la Olimpika Muzeo.



Ĉiujare en Tesaloniko okazas Internacia Maraton-Kuro, organizata honore al macedonia heroo, Aleksandro la Granda (356-323 a.K.)



Antikva mondo en filmoj

Al trezoroj de la monda kulturo apartenas verkoj de la aŭtoroj, kiuj antaŭ jarmiloj vivis en Romio ka Greklando. Tiuj verkoj inspiris multajn artistojn por pentri, komponi aŭ produkti filmojn. Inter ili, verŝajne la plej konata estas „**Heraklo**” (latine: *Hercules* / greke: Ἡρακλῆς – *Herakles*), la hispan-itala filmo.



Por tiaj filmoj, la reĝisoroj dungis tiel belstaturajn kaj fortajn aktorojn, kiel **Steve Reeves** kiu taŭgis por tiaj roloj pli ol iu ajn. Naskiĝinta antaŭ 90 jaroj, dum la 2a mondmilito li servis armeon en Filipina Insularo. Reveninte hejmen en 1947, li komencis entuziasme korp-kulturadon, samjare venkis ĉampionadon en Usono kaj restis la plej juna venkinto en historio de tiu sporto. En sekvaj jaroj li kelkfoje estis ĉampiono de la mondo. Reeves volis fariĝi aktoro sed ne sukcesis en Usono.



Sceno de „Hercules” (Heraklo) apud Egea Maro, kun jugoslav-devena aktorino Syla Koscina.

La juna atleto kun perfekte skulptitaj muskuloj estis tamen rimarkita en Eŭropo kie oni produktis filmojn pri la fortegaj herooj de la antikva mondo. Sekve li aktis en 18 filmoj kaj siatempe estis la plej alte pagata aktoro.




S. Reeves komence de la sukcesa kariero



Ĝenerale, oni malmulte scias ke Esperanto estas bonega pontolingvo inter diversaj kulturoj. Ni uzas ofte tiun ĉi avantaĝon de nia Internacia Lingvo kaj ĉi tie vi povas legi pri legenda persono de la nacia greka kulturo, nomata ankaŭ la "reĝino de greka kinarto".

Irene Papas

S-ino Papas naskiĝis en la sama jaro kiel Steve Reeves (la 3-an de septembro 1926) en vilaĝo Chilimodi, sur Peloponeza duoninsulo. Ambaŭ ŝiaj gepatroj laboris tie kiel instruistoj. Irene komencis aktori junaĝe.



La impresa vizaĝo de Papas antaŭdestinis ŝin ludi rolon de la antikvaj heroinoj, ekz.en: *Virinoj de Trojo, Ifigenio, Antigona kaj Electra.*

Tion montras la filmeto – <https://www.youtube.com/watch?v=gUFMxYPRHBU> (6:17)

Oni ofte invitis Irene Papas labori en teatro kaj filmfarejo. Vere internecian famon donis al ŝi la du filmoj – "Kanonoj de Navarone" kaj "Greko Zorba" kie akompanis ŝin la konataj aktoroj: Anthony Quinn kaj Gregory Peck.



Irene Papas kaj Anthony Quinn en "Kanonoj de Navarone"



Post tiel impona komenco, I. Papas ricevis multajn proponojn ludi en diversaj filmoj, kiel ekz. "Batalo ĉe Sutjeska" (kun Orson Welles, Richard Burton kaj Sergej Bondarĉuk) - pri jugoslavaj partizanoj defendantaj sian landon kontraŭ germana okupado dum la 2a mondmilito. La muzikon por *Batalo ĉe Sutjeska* kaj *Greko Zorba* kreis konata komponisto Mikis Theodorakis. Se vi ankoraŭ ne vidis ilin, ĉi tie ni montras epilogon de tiu dua filmo:

<https://www.youtube.com/watch?v=4UV6HVMRmdk> (3:02)

Kompleta listo de filmoj kun Irene Papas enhavas pli ol 70 titolojn. Krom aktorado, ŝi demonstris ankaŭ muzikan talenton. Tiel aŭdiĝas ŝia kanto "Odes" – <https://www.youtube.com/watch?v=Aq1hodbSDkg> (5:15). Eble por kelkaj tiu melodio memorigos pri la Olimpikaj Ludoj en Grekio.

Sekvi la revon (parto 2)

Kiel vi legis en la unua parto, per sia "Don Kihoto" Cervantes firme eniris la tutmondan kulturon tra poezio, muziko, pentroarto, legendoj, kinarto kaj baletoj.



En jaro 2010, surbaze de la Cervantesa ĉefverko estis produktita filmo en Ĉinio.

Filmon "Viro de La Manĉa" akompanis bela kanto titolita "Malebla /nereala sonĝo" kiun enigis diversnaciaj artistoj al sia repertuaro. Ĉi tie vi povas ĝin aŭdi en tri lingvoj:

France, kantas fama belgo Jacques Brel - https://www.youtube.com/watch?v=iKCmB_13zFw

Tri tenoroj el Germanio - <https://www.youtube.com/watch?v=IC4cCuHXEj0>

Kaj refoje en la hispana - <https://www.youtube.com/watch?v=goRH4-OtXn0> kantas Paloma San Basilio.

En lasta n-ro de "NU" vi povis legi E-tradukon de tiu kanto kaj ĉi sube aldoniĝas ankaŭ en la hispana kaj angla tekstoj.

El sueño imposible

*El soñar... el sueño imposible
Pelear... el enemigo invencible
Soportar ... con dolor insoportable*

*Para correr ... donde el valiente no se atreve a ir
Hacer el bien... al imposible mal
El amor ... puro y casto de lejos
Intentarlo ... cuando tus brazos están muy cansados*

*Para alcanzar ... la estrella inalcanzable
Esta es mi búsqueda,
seguir esa estrella
No importa qué tan desesperado,
no importa lo lejos*

*Para luchar por el derecho,
sin duda ni pausa
Estar dispuesto a marchar al infierno
por una causa celestial.*

*Y sé que si sólo voy a ser cierto,
a esta búsqueda gloriosa,
Que mi corazón se encuentre pacífico y tranquilo,
Cuando me acueste a descansar*

*Y el mundo será mejor para esto:
Que un hombre, despreciado y lleno de cicatrices,
Aun se empeñaba, con su última gota de valor,
Alcanzar ... la estrella inalcanzable ...*

The impossible dream

*To dream the impossible dream
To fight the unbeatable foe
To bear with unbearable sorrow
To run where the brave dare not go*

*To right the unrightable wrong
To love pure and chaste from afar
To try when your arms are too weary
To reach the unreachable star*

*This is my quest
To follow that star
No matter how hopeless
No matter how far*

*To fight for the right
Without question or pause
To be willing to march into Hell
For a heavenly cause*

*And I know if I'll only be true
To this glorious quest
That my heart will lie peaceful and calm
When I'm laid to my rest*

*And the world will be better for this
That one man, scorned and covered with scars
Still strove with his last ounce of courage
To reach the unreachable star.*

Cervantes iĝis populara ankaŭ inter esperantistoj jam komence de la pasinta jarcento, ĉar lian ĉefverkon oni kelkfoje tradukis al Esperanto. En jaro 1905, tri ĉapitroj el tiu libro tradukis E-grupo el Murcia.

La sekvaj partoj el „Don Kihote el Manĉo” estis tradukitaj en: Barcelono (1909, 1924), en Madrido -1927 kaj en Valencio - 1955. La plej grandan E-tradukon faris Fernando de Diego kaj tiu 820-paĝa libreto aperis en 1977 kun ilustraĵoj, danke al Madrida Fundacion Esperanto.



En jaro 1909, tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto, Theophile Cart (Teofilo Kart) verkis ardan „poemon en prozo” pri Don Kihote kaj ĝin dediĉis al esperantistaj aktivuloj:



*Ho Don Kihoto, filo de nobla Hispanujo,
respekte vin salutas mia kanto!*

La homo elturniĝemaj vin mokas, kaj sur iliaj lipoj via nomo estas insulto. Ĉar vi iras firme antaŭen kaj sentime defendas la justecon, ilia diplomatio vin severe kritikas. Ĉar vi ne vin demandas, ĉu al viaj klopodoj respondos la sukceso, ili vin juĝas freneza.

La ambiciuloj vin ridindigas kaj kun malestimo ili citas vian nomon. Ĉar vi ne konas la arton flati potenculojn, nek vivi apud la estroj, ili ŝercas pri via soleco. Ĉar anstataŭ sendi la aliajn en la batalon, vi iras mem kaj ricevas pli da batoj ol da laŭroj, malŝate ili rigardas vin de sia alta, saĝa neŭtraleco. La sprituloj ridas pri vi kaj via nomo estas al ili sinonimo de naiveco. Ĉar vi protektas la rajton de l' malfortulo kaj malamas la arogantecon, ili vin diras simplulo. Car vi enskribis sur vian ŝildon la vortojn: Fideleco, Vereco, Lojaleco, ilia vivsperto ride kun indulgo. Sed kion valoras la moko de l'homoj elturnigemaj, la rido de l' ambiciuloj, la rideto de l'sprituloj ?

Revante vian belan revon, ho Don Kihoto, vi iris fidele kaj obstine la vojon elektitan, kaj glorinda estas via nomo! Vi ankaŭ, ho ĉiutempaj Don Kihotoj, restu fidelaj, iru senŝanceliĝe vian vojon, revu vian belan revon : Nenio granda fariĝis sur la tero, se ne dank'al viaj senlacaj, sentimaj bataloj! Ho Don Kihoto, filo de nobla Hispanujo, respekte vin salutas mia kanto.

En esperanta literaturo aperis libro „Verdaj Donkiĥotoj” - satira novelo pri E-movado verkita de **Julio Baghy**. La aŭtoro dum la tuta vivo laboris por Esperanto kun siaj talentoj de aktoro, poeto kaj preleganto. Esperantistoj ege lin ŝatis kaj nomis karese „Paĉjo”. Naskiĝinta antaŭ 125 jaroj, Baghy bonege konis la movadon, partoprenis en diversaj E-aranĝoj, vizitis multajn E-klubojn eksterlande.

Li estis tre bona instruisto laŭ populara Cseh-metodo. Siajn memorarojn pri E-instruado en Siberio, Baghy priskribis en ĉarma libreto kiun titoligis „**La verda koro**”. Tiuj mallongaj rakontoj, majstre verkitaj en simpla lingvaĵo, estas unu el plej bonaj lekturoj por komencantaj esperantistoj. Baghy verkis multe: poemojn, novelojn kaj teatraĵojn kaj, dum la *romantika periodo de Esperanto*, kun K. Kalocsay li formis la t.n. Budapeŝtan Skolon” - kiu fariĝis unu el mejloŝtonoj en la historio de E-literaturo.



Apud la statuo de Cervantes en urbo Alcalá de Henares, cikonioj konstruis la neston - simbolon de familia printempo.



Celebrante "Jaron de Cervantes", dum la Hispana E-Kongreso en junio 2016, oni prezentis la kompletan tradukon de *La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha* en la bita eldono.

*Estas io bela kaj etika en organizado
de la homa peno.*

Maksimiliano Kolbe

Patrono de la esperantistoj (Parto 3)

Tre malmulte oni scias pri kunlaboro de Niepokalanów kun Instituto pri Organizado. Ĉio komenciĝis fine de la 1920aj jaroj, kiam ĉe Varsovia Politekniko laboris prof. Karol Adamiecki*, kreinto de Scienca Instituto pri Organizado (SIO). Kiel konfesis en siaj rememoroj lia filino Regina, profesoro rakontis al ŝi ke:

"P. Maksimiliano aperis en la Instituto kaj tio estis granda travivaĵo. Niaj agadoj iris laŭ diversaj vojoj sed nin ambaŭ interesis la teorio pri scienca organizado. Do ni decidis apogi unu la alian sur ĉi tiu kampo. Tiel Niepokalanów povos fariĝi bona loko por praktiki la principojn de harmonia kunlaboro".



Tiel aspektis komence la presejo.
Se la milito ne eksplodus, tie eldoniĝus
kelklingvaj periodaĵoj, verŝajne ankaŭ en Esperanto.



P. Kolbe parolas kun membroj de la fajrobrigado

La delegiton al SIO oni elektis fr. Wawrzyniec (Laŭrenco) Podwapiński, kiu ekgvidis la novan Sekretariaton por Plibonigoj. Oni abonis la SIO-publikaĵon "Organiza Revuo" kaj diskonigis ĝin en jenaj fakoj: redakcio, administra-elsenda, teknika, konstrua, proviza kaj medicina. Kunlaboro inter ISO kaj Niepokalanów iĝis regula, daŭris la korespondado kaj venis novaj lernolibroj pri entreprena organizado. Laŭ tiuj principoj, ĉiu kunlaboranto devus trairi praktike la tutan ciklon de produktado por havi ĝeneralan scion pri la entrepreno. P. Maksimilian ne rekomendis troan specialiĝon, kiu igas homon rigida kaj neprodukta. En siaj subulaj fratoj, li klopodis liberigi la senson de respondeco kaj inventemo. Ĉiu povis transiri al tiu fakoj, kiu lin plej interesas.

Kiam ni atingas kvaliton, kvanto mem aliĝos

Kiam p. Kolbe forveturis al Japanio, en Niepokalanów oni plu daŭrigis la „sciencan organizadon” kaj tio fariĝis la granda pasio de Fr. Wawrzyniec. Por evitigi perdon de la materialoj, tempo kaj energio, li decidis esplori la rilatojn inter la kondiĉoj kaj rimedoj por krei modelon de la efektiva agado. Fine oni devus ekzameni ĉu kaj kial la rezultoj malsamas kun la difinita modelo. Tiutempe oni ĝenerale praktikis la *formulon de ekvilibro* de **Henry Le Catelier** (1850-1936), franca kemiisto kiu en siaj eksperimentoj ne konsideris la fazon de planado.

*„Malamo ne povas krei,
nur amo estas krea” (M.Kolbe)*



Niepokalanów troviĝas en distrikto de Łowicz (: loviĉ) kiu situas okcidente de Varsovio kaj estas konata pro sia riĉa folkloro.

Mirindas, kiel M.Kolbe, tiu malforta korpe kaj ofte malsana monaĥo povis plani kaj realigi la tre grandajn projektojn, kiuj disvastiĝis kaj funkcias ĝis hodiaŭ? Malgraŭ tiaj limigoj kaj diversaj obstakloj, p. Maksimiliano estis la simpla, serena "homo de ago".

En li, filozofio kaj teorio realiĝis en praktika agado. En la tempoj, kiam preskaŭ neniu aŭdis pri veturado trans la ter-atmosferon, li kiel studento interesiĝis pri fiziko kaj astronomio, faris projektojn pri la interplanedaj raketoj. Poste li devis okupiĝi pri problemoj pli proksimaj al tero: konstruado, presejo, distribua reto, radiostacio, fajrobrigado, humana helpo al viktimoj de la milito... En liaj planoj estis eĉ televido kaj la regiona flughaveneto por rapida kolportado de la periodaĵoj kaj libroj. Tiam malkovriĝis lia granda talento por organizado. Nu bone, sed nura talento ne ĉiam sufiĉas, por tia taskaro li bezonis amaso da tempo. Dume ni ĉiuj disponas nur pri 24 horoj. Oni certe povas demandi: Kiam li dormis? De kie li prenis energion por kunordigi laboron en tiel diversaj entreprenoj? Eble parton de la respondo ni trovas en liaj pensoj, inter kiuj ni elektis kelkajn por la fino de ĉi tiu artikolo. Necesas aldoni ke ĉiu sugesto, konsilo aŭ averto kiun p. Maksimiliano donis – unue estis provita de li mem. Liaj paroloj estis mallongaj sed profundaj. Antaŭ ĉio, Maksimiliano Kolbe havis neskueblan kredon ke bono venkas malbonon.



Panoramo de la nuntempa Niepokalanów

M. Kolbe - Pensaro

Vivo signifas movadon, strebon al celo. Kaj komunumo vivas kiam havas klare difinitan celon kaj rekte antaŭeniras por ĝin atingi. En la mondo okazas senĉesa batalo inter bono kaj malbono. Tial homoj laborantaj por bono bezonas apogon. Pli utilas laŭdi bonon ke ĝi logu al sekvado, ol riproĉi erarojn. Ne indas troigi, miksiĝi en detalojn de malbono; ne pli ol tio necesas por la korekto. Et-anima homo multe parolas pri alies faloj kaj la fervora – pri liaj avantaĝoj.

Kvankam ne ĉiuj ŝatas veron, tamen nur vero povas esti la fundamento de firma feliĉo. Feliĉo konstruita sur malvero, samkiel ĉiu mensogo, ne povas daŭri longe. Ĉiuj sopiras al feliĉo kaj ĝin postkuras, sed ne multaj ĝin trovas. Feliĉon serĉas ĉiu homo. Eĉ pli: ni volas ke tiu feliĉo daŭru longe, eble plej longe - senfine. Sed homo kiu tiel forte deziras feliĉon, restas fakte “malriĉa” kiam serĉas ĝin inter la forpasantaj aĵoj de la mondo.

Pli facilas aktivadi ekstere ol batali kontraŭ nia propra malforteco kaj ĉi tiu batalo estas tre malfacila. Ni devas bone uzi ĉiun horon, ĉar ni ne scias ĉu la sekva al ni apartenos. Neniu pasinta minuto revenos kaj eĉ miraklo ne povas ĝin haltigi. Kiel ni uzas ĝin, tia ĝi restos por ĉiam. Ĉi tiu vero helpu nin bone uzi nian tempon, ĉiun momenton.

Preĝo revivigas la mondon. Ĝi estas la necesa kondiĉo al fortigo de ĉiu animo. Se mankas preĝo, tiam animo svenas kaj tiel ja devas okazi. Tial, dum la tuta tago, fluas senhalta torento de preĝoj – tiu plej granda potenco, kapabla nin transformi kaj ŝanĝi vizaĝon de la tero.


Pioniroj de scienca organizado



Henry Le Catelier



Frederick Taylor



Karol Adamiecki

Post **Le Catelier**, oni rekonis ke bazon por la scienca organizado kreis usona memedukito **Frederick Taylor** (1856-1915). Sian praktikan rigardon je la vivo li transigis al industria kampo, kiam neniu ankoraŭ pri tio pensis. Laŭ Taylor, gravas nur tiu agado, kies rezulto kontribuas al profito de la entrepreno.

Per liaj rekomendoj, eĉ simplaj plibonigoj en labormaniero donis surprizan kreskon de produktiveco. Post 25-jaraj spertoj, Taylor verkis libron "Administrado de metiejo" (*Shop management*), kiu estis la turnopunkto en historio de tiu scienco. Liajn metodojn oni aplikis en muntoĉenoj de „Ford” - usona aŭtofabriko. Tamen estis tie la homoj, kiuj trovis erarojn en lia metodo. Ili opiniis ke ĉiu sistemo, kiu celas nur al konstanta plirapidigo de laboro (por ke la fina produkto estu eble plej malmulte kosta) – pli al malpli frue gvidos al ekspluatado de laboristoj.

Entrepreniko / ergonomio

Komence de la 20a jarcento ankaŭ aliaj specialistoj okupiĝis pri tiu problemo. Inter ili estis la komence menciita inĝeniero **Karol Adamecki** (1866-1933). Dum Taylor koncentriĝis pri tio, kiel pliefektivigi produktivecon de unuopa laboristo, Adamecki rigardis la problemon je pli vasta perspektivo ĉar, en granda produktado, decidas antaŭ ĉio kunlaboro en kaj inter teamoj. Tial, por bona funkciado de ĉiu entrepreno, necesas organizi harmonian kunagadon inter la tri* ĉefaj elementoj (grafike lokitaj sur la pintoj de triangulo):

- M – materialo, maŝinoj, ilaro;
- L – laboro, laŭtempa kunordigado de la agoj;
- H – homoj kaj rilatoj inter ili.

Tiu triobla harmonio inter la supraj elementoj estas la bazo por efika funkciado de ĉiu entrepreno. Kiam la tiamaj submastroj suspektis, ke nesufiĉa produktiveco okazas pro malrapidemo de laboristoj, Adamecki atentigis ke la kaŭzo troviĝas aliloke. Ĝin povas kaŭzi manko de ĝustaj maŝinoj kaj /aŭ malbona kunordigado de laboro.

* Estas interese, ke simile rigardas tiun problemon Toyota, la tre moderna fabriko de aŭtomobiloj. Laŭ ĝia koncepto, la tri M-faktoroj malhelpas al efektiva produktado: *muda* – senutilaj agoj, *mura* – nereguleco kaj (interese!) *muri* – troa laborigo, eble pro tio ke ĝi bremsas pensadon.

Asizo post 30 jaroj



Fine de oktobro 1986, fama itala urbeto Asizo estis nomita la "ĉef-urbo de paco" ĉar tie okazis la unua Monda Preĝtago por Paco. Iniciatis ĝin Johano Paŭlo 2a, la granda amiko amiko de Esperanto. Je lia invito, al Asizo venis 160 religiaj gvidantoj el ĉiuj partoj de la mondo. Ili estis reprezentantoj de 32 kristanaj eklezioj kaj de aliaj grandaj religioj.

En la nomo de kristanaj eklezioj, elstaris: ĉefepiskopo R.Runcie – gvidanto de anglikana eklezio, d-ro E.Castro – sekretario el Monda Konsilio de Eklezioj, patriarkoj de Rusa kaj Bulgara Ortodoksaj Eklezioj, Ekumena Patriarko de Konstantinopolo kaj membroj de diversaj protestantaj eklezioj.



Venis gvidantoj de aliaj grandaj religioj, kiel budhismo, islamo, hinduismo, moseismo (judaistoj) zaratuŝtristoj, sikistoj, ŝintoistaj sacerdotoj el Japanio, reprezentantoj de afrikaj malnovaj tradicioj kaj indianoj el Nordameriko.

Ili ĉiuj reprezentis kelkajn miliardojn da homoj, pro kio renkontiĝo "Asizo-1986" estis verŝajne la plej grava evento en la tuta historio de porpaca movado.

Kontraŭ tiu grandioza kaj senprecedenca evento, aperis malicaj kritikoj ke tio estis skandalo organizi la eventon en kiu papo renkontiĝas kaj preĝas kun gvidantoj de aliaj religioj. Laŭ tiaj opinioj, per „Asizo-1986” la papo perfidis kristanojn. Similajn riproĉojn oni foje aŭdas eĉ hodiaŭ, post 30 jaroj.

Unue, oni devas klare memori ke ĉiuj partoprenintoj veturis longan vojon al Asizo por manifesti la homaran soifon por paco. Ili esprimas la solidarecon kun ĉiuj pacdefendantoj kaj kun tiuj suferantaj pro militoj. **Due**, inter la diversaj religioj ekzistas tiel grandaj diferencoj, ke ilia komuna preĝo verŝajne ne povus okazi, ĉar gvidus nur al granda konfuzo. Pro tio, por ĉiuj alvenintoj, estis aranĝita nur komuna ĉeesto kun *silenta meditado*, post kiu la kristanoj ariĝis en la baziliko por kune deklami la universalan preĝon – "Patro nia".



Samtempe, por la reprezentantoj de aliaj religioj oni disponigis apartajn aŭlojn kaj ĉambregojn ke ili trankvile povu tie preĝi, laŭ siaj propraj tradicioj. Ili ĉiuj, forprenis al siaj landoj la gravan "mesaĝon de Asizo"- ke urĝas kunigi fortojn de ĉiuj honestaj homoj por defendi pacon en la suferanta mondo. **Trie**, sole pro la kuraĝigaa strebo defendi mondpacon kaj organizi - unufoje en la historio - tian renkontiĝon, oni povas nomi tiun papon Johano Paŭlo la Granda. Des pli, se oni poste lin atakis per malicaj kritikoj kaj maljustaj akuzoj. Antaŭ ol kritiki iun, estas pli bone kunfronti la onidirojn kun la originala fonto. Sube vi povas legi kelkajn partojn de la parolo, per kiu li adiaŭis la partoprenantojn de "Asizo-1986":

Miaj karaj fratoj kaj fratinoj,
gvidantoj de kristanaj komunumoj kaj reprezentantoj de alia religioj.
Karaj geamikoj!

Konkludante ĉi tiun Mondan Tagon de Preĝoj por Paco, mi volas danki ke vi akceptis mian inviton kaj alvenis ĉi tien el multaj partoj de la mondo. Ni kristanoj nomas Jesuon Kriston Savanto de ĉiuj homoj kaj la "Princo de Paco" kies naskiĝon salutis ĉielo per anĝela kanto: *Gloria in excelsis Deo et in terra pax hominibus bonae voluntatis* ("Gloro al Dio en ĉielaj altoj kaj surtere - paco al homo de bona volo"). Tiu ĝoja konvinko igas min saluti ĉiun elinter vi, kun amo kaj profunda respekto.

Same inter la kristanoj, kiel kun alilaj grandaj religioj, ni konsentas pri graveco de la homa konscio, kies imperativo postulas serĉi la veron, ami sian najbaron kaj apudajn popolojn. Tion rekomendas ankaŭ la "**Ora Regulo**" – *Traktu aliajn kiel vi mem volus esti traktita*. Ĉi tiu principo estas la fundamento de paco por ĉiuj religioj. Jes, ni obeas la voĉon de konscienco ĉar ĝi estas esenca elemento por pli bona kaj paca mondo. Ĉu povas esti kontraŭe se ni ĉiuj, viroj kaj virinoj, havas komunan originon kaj komunan destinton? Eĉ se inter ni ekzistas gravaj diferencoj, tamen defias nin tiu drama alternativo: kion elekti - justan pacon aŭ katastrofon de milito?



Ni venis al Asizo kiel heroldoj, kiuj atentigas ke la tuta homaro soifas al paco kaj volas en paco vivi.

Paco bezonas ne nur heroldojn, sed ankaŭ multajn volontulojn, kiuj ĝin konstruos sur la kvar firmaj kolonoj de justeco, vero, amo kaj libero.



Ekzistas nur du eblecoj: aŭ ni ĉiuj lernos iri kune en paco kaj harmonio aŭ ni drivos dise, subigitaj al senĉesaj konfliktoj, kiuj ruinigos la vivon. En siaj loĝlokoj, eĉ per malgrandaj agoj de la ĉiutaga vivo, la homoj povas elekti la vojon de paco aŭ tiun de konfliktoj. Ni konfidas tiun mesaĝon *precipe al junulaj generacioj*, ke ili helpu liberigi la historion de tiuj misvoj, sur kiuj la homaro vagis erare. Ni invitas ĉiujn ŝtatestrojn kaj internaciajn organizaĵojn ke ili senlace formu strukturojn de dialogo kie paco estas minacita. De nia flanko, ili ĉiam povas kalkuli je la apogo por subteni kaj restarigi pacon. Ni ankaŭ deklaras kuraĝigon por la Unuiĝintaj Nacioj (UNO) ke, per la tuta aŭtoritato, ĝi plenumu sian universalan mision serve al paco.

Unuafoje en la historio, ni renkontiĝas kune: kristanaj eklezioj, komunumoj kaj aliaj grandaj religioj de la mondo. Ĉi tie, en la urbo de s-ta Francisko kaj fronte al al mondo, ni memorigas pri transcenda kvalito de paco. Defio kontraŭ paco, en la okuloj de ĉiu homa konscio, estas fakte la problemo de vivo aŭ morto. Pro tio, neniu ŝatestro kaj neniu politikisto havas rajton riski la katastrofon, kiun la homaro probable ne travivos. Hodiaŭ, en la tuta mondo aŭdiĝas vokoj de solidareco kaj socia justeco.

Ni klopodos esti pac-defendantoj kaj al tiu nobla celo ni invitas ĉiujn fratojn kaj fratinojn. Niaj koroj ka pensoj estas fokusitaj por konstrui unuecon de la tuta homaro. Karaj amikoj, ni kune marŝis en silento, ni fastis, ni preĝis - ĉiu laŭ sia propra tradicio. Permesu, ke mi refoje esprimos mian dankemon al ĉiu inter vi, al kristanoj kaj al reprezentantoj de aliaj religioj, ke vi respondis al mia invito kaj bonvolis alveni por manifesti solidarecon kun la tuta homaro, soifanta al justeco kaj paco. Fine mi etendas dankojn ankaŭ al franciskana komunumo de Asizo, kiu nin gastigis. Ĝia fondinto, s-ta Francisko famigis ĉi tiun urbeton per sia arda amo al Dio kaj al ĉiuj Liaj kreitaĵoj. Tiel, antaŭ ĉio mi dankas Dion por ĉi tiu grandioza tago, plena de gracoj kaj tiucele mi uzas la vortojn atribuitajn al s-ta Francisko:



Statuo de s. Francisko
kun pacigita lupo

*Sinjoro, faru min ilo de via paco.
Kie estas malamo
- permesu ke mi radios per amo;
pardonon - kie estas ofendo;
fidon - kie estas dubo;
esperon - kie subpremas malĝojo;
lumon - kie regas obskuro;
veron - kie disvastiĝas mensogoj;
unuiĝon – kiam disigas kvereloj;
ĝojon - kiam malgajas la mondo.*

*Dia Majstro!
Permesu, ke mi penu esti
ne tiom konsolata, kiom konsoli;
ne tiom esti komprenata, kiom kompreni;
ne tiom esti amata, kiom ami.
Ĉar donante, ni ricevas;
pardonante, ni estas pardonataj;
kaj mortante - ni naskiĝas por la eterna Vivo.*

Fine de la pasinta jarmilo (en junio 1999), oni distingis Johanon Paŭlon la 2a per **Medalo de Toleremo**. La ceremonio okazis dum lia vizito en la regiono de Bjalistoko, kie naskiĝis la ideo lanĉi tiun medalon memore al la kreinto de Esperanto. Apogis tion lokaj instancoj kaj loĝantoj de la urbo, sed ĉefe kontribuis al ĝi kelkaj personoj: prof. H. Konopka el Bjalistoka Universitato, konata esperantisto R. Dobrzyński kaj nepo de L.Zamenhof, d-ro Zaleski-Zamenhof kiu persone enmanigis la medalon al papo.



Arte tiun medalon projektis D.Grozdev, bulgario vivanta en Bjalistoko. Sur la unua flanko (averso) videblas branĉeto, simbolo de paco kiun tenas du manoj. Dorsaflanke /reverse estas portreto de Zamenhof kun fono de bjalistoka Branicki-palaco (nuntempe Medicina Akademio).



Kristoforo Zaleski-Zamenhof konfesis, ke la ideon inspiris la "**Preĝo sub la verda standardo**" kiun verkis lia avo por memorigi, ke ni ĉiuj estas gefiloj de unu Dio kaj alvokis je konkorda kunvivo. En sia „Unua libro” Ludoviko Zamenhof inkluzivis la universalan preĝon „Pater noster” (*Patro nia*). Tiu libro aperis unue en kvar lingvoj (rusa, pola, germana kaj franca) kaj Zamenhof insistis ke la aliaj eldonoj ankaŭ ĝin enhavu. Eble li, kiel pacema homo, ŝatis ties lastajn vortojn: „... *pardonu al ni niajn ŝuldojn kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj*” ĉar ili malakceptas venĝon aŭ perforton kaj apelacias je mizerikordo. D-ro Zaleski-Zamenhof pravigis la decidon ke la unua Medalo de Toleremo estu destinita al Johano Paŭlo II, kiu dum jardekoj laboras senlace por internacia amikeco kaj estas unusola ŝtatestro kiu publike uzas Esperanton.

La Mondan Tagon de Preĝoj por Paco en Asizo oni organizis poste kelkfoje, en jaroj: 2002, 2011 kaj en la kuranta jaro 2016.

Nia Vilaĝo

Homo kaj naturo

Hodiaŭ ni artikolas pri Provenco, la regiono situata en sudorienta Francio, laŭ Mediteranea Marbordo. Por tiu temo ekzistas du kaŭzoj: unue ĉar tie oni kultivas multege da olivarboj kaj due – pro la konata al vi aktorino, kiu translokiĝis tien kaj verkas librojn pri olivoj.



Jean-Marc Janiaczyk: Apudmara vilaĝo en Provenco.

En Provenco vivis la fama Vincent van Gogh, sur kies bildoj la suda suno lumigas abunde la kampojn de tritiko, de sunfloroj kaj kreskantajn apudvoje cipresojn. Lia arto troveblas ĉie: en la plej grandaj muzeoj, bibliotekaj albumoj kaj en privataj kolektoj de riĉuloj. Pro tio, ni decidis ilustri la titolon per arto de amato, kiu eble vivas tie ĉar faris multajn pentraĵojn pri la sudfranca kamparo. Sur la supra bildo, apud la ĉedoma vojo videblas vicoj de violkoloraj kreskaĵoj. Tio estas lavendo (*Lavandula spica* L.) - la tipa planto por tiu provinco. Sed ĉifoje ni prezentas al vi aliaĵon.

Utilaj plantoj: **Olivujo**

Olivarbo /olivujo (*Olea europaea*) estas ĉiamverda arbo aŭ arbusto mezgranda arbo el familio de oleacoj (*Oleaceae*), kiu atingas altecon ĝis 12 metroj. La arbo mem povas vivi tre longe, foje pli ol mil jarojn. Olivujo kreskas ĉefe en la regionego ĉirkaŭanta Mediteranean Maron, kie klimato estas varma, seka aŭ eĉ duondezerta. En lastaj jarcentoj oni ĝin adoptis ankaŭ en aliaj mond-anguloj, kun simila naturmedio. Vintre olivarboj ne toleras temperaturon malpli altan ol 10 gradojn sub 0°C.



Pro la forta radikaro, ili povas kreski sur malfekunda, ŝtona grundo kaj sur montaj deklivoj, precipe riĉaj je kalk-rokoj.

Homoj kultivas olivarbojn ekde la 4a jarmilo a.K. Oni supozas ke kultivadon de olivoj komencis loĝantoj de antikva Persujo (nuntempa Irano) kaj Mezopotamio, t.e. teritorio en Irako, inter la riveroj Tigriso kaj Eŭfrato.

La plej malnovajn elfosaĵoj montris, ke olivarboj oni uzis en Sirio kaj Palestino. Sur Kreta insulo en Grekio, oni trovis argilan tableton kun bildo de oliv-branĉeto.

Frukto de olivarbo estas drupforma, plej ofte ĉ. 2 centimetrojn longa, grizverda kaj (post la maturiĝo) bruna aŭ blu-nigra. La fruktoj estas riĉaj je vitamino B, natrio, karbonhidrato, polifenolo (ekz. tirosol, fenolacido kaj flavonol), kalcio, fero kaj magnezio.

Oliv-fruktoj estas manĝeblaj krude, sed kutime oni ilin konservas per salo aŭ marakvo kaj (por loka uzado) - foje ilin sekigas.



Antaŭ konservado, oni kutime forigas kernon el olivfruktoj kaj plenigas ilin per kapsiko, ajlo, fromaĝo, kaparoj? (*Capparis* L.) aŭ migdalo.

Je larĝa skalo, manĝaĵindustrio marinadas la fruktojn en vitropotoj aŭ ladskatoloj, uzante por tio vinagron.

Oni povas uzi la fruktojn por fajnigi diversmaniere manĝaĵon en kuirejo (kiel ekz. sur la tre populara pico). Fruktoj de olivujo apartenas al "baza trio" de la mediteranea kuirarto; aliaj du estas tritiko kaj vinberoj.





Ni povas aldoni kelkajn vortojn pri la violet-koloraj olivoj (*kalamata olivoj*) kiuj kreskas en Peloponeza Duinsulo.

Ili gustas pli delikate kaj estas ofte uzataj en "greka salato".



Monda rikolto de olivfruktoj egalas al ĉ. 20 milionoj da tunoj dum unu jaro.
El tio, 75% venas el tri landoj: Hispanio, Italio kaj Greklando.

Malgraŭ la menciitaj avantaĝoj de olivofruktoj mem, pli ol 80% de la mondaj rikoltoj oni uzas al produktado de oliv-oleo.



Oleo farita el plej valoraj olivspecoj uzeblas kiel bonega graso por friti aŭ kiel aldonaĵo al salatoj. Kosmetika industrio uzas malpli bonan oleon al produktado de sapo por infanoj aŭ por alergie sentemaj haŭtoj, kiel kuracila kremo ktp. Arĝentverdaj folioj de olivarbo (*Oleae folium*) utilas en herbokuracado.

Post aktorado, vivo ĉe la naturo

En lasta numero de „NU” vi povis legi pri la 100-jara datreveno de James Herriot, la fama best-kuracisto. Okaze de tiu jubileo, la kvar ĉefaktoroj el filmo „Ĉiuj kreitaĵoj, grandaj kaj etaj” veturis al Jorkŝira regiono kie d-ro Herriot vivis kaj laboris. La kvaropo aktora renkontiĝis tie por celebri tiun jubileon. Kelkdek jaroj pasis ekde kiam la filmo estis produktita kaj kompreneble ŝanĝis aspekton de la homoj*.

La rolon de Helena, edzino de d-ro Herriot, ludis **Carol Drinkwater** kaj tiu filmo igis ŝin fama. Carol (Karolino) Drinkwater estis tre populara aktorino, irland-devena. Ŝi naskiĝis en Anglio sed infanaĝe vivis en Irlando, plej ofte en la familia farmbieno aŭ en Irlanda Konvento de Kent (Anglio).

Jam komence de sia kariero, ŝi estis membro de la renoma Nacia Teatra Trupo kaj ludis en multaj televidaj filmoj. Al ŝiaj aktoraj atingiĝoj apartenas i.a. kunlaboro en la Nacia Teatro kun fama Laurence Olivier, en filmoj kun Stanley Kubrick kaj Max von Sydow.



Tamen C. Drinkwater frue ĉesis aktori, edziniĝis kun franca sendependa filmisto Michel Noll kaj translokiĝis al Provenco, suda Francio. Ekde tiam, ŝi vivas en olivplantejo, lokita sur monteta regiono de Cannes, de kie videblas Lazura Marbordo. S-ino Drinkwater plu aktivas en filmfarado, sed ne plu fikcia. Ŝi preferas verki beletra-stile librojn pri kultivado de olivarboj.





Jen kelkaj titoloj:

- Oliv-farmo*
- La itinero de olivoj*
- Ilustrita oliv-farmo*
- Sezono de olivoj*
- Olivrikolto*
- Forgesita somero*
- Reveno al oliva farmo*

Tiuj libroj enhavas multe da interesaj informoj pri olivkulturo kaj estas tradukitaj al diversaj lingvoj (ni vidis ilin en la ĉeĥa, ĉina, pola, rusa, kaj sveda). Ili popularigas je internacia skalo la historion, kuirarton kaj tradicion kulturon de olivoj en la regionoj troviĝantaj laŭ norda bordo de Mediteranea Maro.

Tiumaniere C. Drinkwater fariĝis rekonita specialisto pri kulturo de olivoj kaj oni invitas ŝin al diversaj landoj por literaturaj vesperoj, prelegoj kaj renkontiĝoj kun la legantoj. Al eksperta grupo invitis ŝin UNESKO, por kunkrei la *Mediteranean Itineron de Oliva Heritaĝo*. Nuntempe ŝi kun la edzo preparas dokumentan filmon pri kultivado de olivoj ĉirkaŭ Mediteranea Maro kaj UNESKO patronas tiun projekton.



„Oliva farmo” estas la duobla amrakonto. Unue, pri reciproka enamiĝo de la aŭtorino kun televida produktisto Mikaelo. Due, amo al unu konkreta loko en la mondo. La edziniĝinta geduo decidis ekloĝi en franca kamparo. Karolino kaj Mikaelo trovis forlasitan olivfarmon kaj, malgraŭ la detruita domo, ili eksentis ke tio estos la peco de ilia paradizo. Same kiel oliv-fruktoj ŝanĝas siajn kolorojn de la verda, tra ruĝa ĝis brile nigra – tiel ilia vivo invitas eniri la vibrantan atmosferon de la mediteranea naturo. Per tiuj libroj, la legantoj konatiĝas kun provencaj kutimoj kaj kuirarto, sentas la streĉojn pro bankrotita risko komence de la rekonstruota domruino, malsano de la edzo ktp. Inter ĉia tio, ne mankis tagoj feliĉaj kiel ekzemple dum la unua rikolto el la propra olivbieno.



Gesinjoroj Noll- Drinkwater: komuna hobia proksimigas homojn

S-no Drinkwater evidente ĝuas vivi en Provenco, kontakti ties vilaĝanojn, frandi fruktojn, gustumi vinojn kaj surloke faritajn fromaĝojn. Estas bone trovi sian lokon sub la suno. Verŝajne tiuj libroj inspiris multajn legantojn trovi ĉarmojn kaj belecon - ankaŭ en sia naskiĝurbo aŭ familia vilaĝo.



* Aktora kvaropo venis al Jorkŝira regiono, kie vivis James Herriot. Ili festis la 100-jaran datrevenon de lia naskiĝo.

La unua foto montras ilin en la filmo, farita antaŭ 40 jaroj. Kvankam tempo senindulge ŝanĝas aspekton de ĉiu, gravas teni la koron juna.